

PRI UNU PROVO DE KRITIKO KONTRAŬ PLENA ANALIZA GRAMATIKO DE ESPERANTO

En sia artikolo «Kontraŭ komplikadon de Esperanto» (*Paco*, 1982, 1) Violin Oljanov submetas al kritiko multajn solvojn, proponitajn en *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. Konsidere al la graveco por la Esperanto-evoluo de la kritikita verko, la kritiko ne devas resti preteratentata.

1. Malaprobante la terminon *adjekto* kaj pledante por *cirkonstanca komplemento*, Oljanov skribas:

«Dum adjekto nenion diras al la lernantoj, cirkonstanca komplemento tuj malkovras la esencon de la frazelemento...».

La kritiko tuŝas ne nur terminologian problemon, sed problemon multe pli profundan, la problemon pri tio, kiam la vorto «parolas».

La vorto «parolas», t.e. «tuj malkovras» sian signifon, kiam oni scias ĝin. Se oni ne scias la signifon de *cirkonstanca komplemento*, tiu ĉi kunmetaĵo ne povas ne nur tuj, sed entute malkovri sian signifon. Ankaŭ la termino *adjekto* diros nenion al tiuj, kiuj ne scias ĝian signifon. Sed por tiuj, kiuj scias la signifon de la termino *adjekto*, tiu ĉi termino plenumos sian funkcion tiel bone, kiel la termino *cirkonstanca komplemento*.

El pure terminologia vidpunkto evidentas, ke preferindas *lokadjektoj*, *tempadjektoj*, *celadkejoj* ktp ol *lokaj cirkonstancaj komplementoj*, *tempaj cirkonstancaj komplementoj*, *celaj cirkonstancaj komplementoj* ktp. La strebo al mallongeco estas fundamenta leĝo de la lingvo. Ne *cirkonstanca komplemento*, sed *adjekto* estas konforma al tiu ĉi leĝo.

2. Oljanov skribas:

«PAGE nomas *objekto* la objektan komplementon. Tiun ĉi pli mallongan formon ni povas uzi en la praktiko; tamen, kiam oni konigas al la legantoj (lernantoj) novan bazan nocion, oni devas ĝin prezenti en la plena, scienca formo. Des pli, la vorto *objekto* estas plursignifa kaj povas rezultigi miskomprenon».

Ankaŭ tiu ĉi kritika noto tuŝas bazajn principojn.

Laŭ Oljanov, ekzistas sciencaj kaj nesciencaj formoj de la vortoj. *Objekta komplemento* estas scienca formo, sed *objekto* estas nescienca formo.

Ne ekzistas sciencaj kaj nesciencaj formoj de la vortoj. La formo de la vorto estas tia, kian la lingva komunaĵo fiksas. Se oni decidos uzi iun vorton en la scienco, la vorto fariĝas «scienca». Se oni komencos uzi ian «sciencajn» formon ekster la scienco, la vorto fariĝas «nescienca».

Oljanov ne aprobas la terminon *objekto* pro ĝia plursignifeco.

Unusignifaj vortoj tamen ne ekzistas. Ĉiuj vortoj estas plursignifaj. Tio estas la plej granda avantaĝo de la lingvo. Per kiu sia signifo «parolos» la vorto, dependas de la kunteksto. Uzita la termino *objekto* en PAGE-kunteksto, ĝi

signifos, ke temas pri «frazelemento esprimanta tion, al kio la ago pli malpli rekte direktiĝas, kion la ago trafas», kia estas la difino, donita de *PAGE*. Do, la timo pri miskompreno estas senfunda.

Ankaŭ ĉi tie oni devas emfazi, ke el pure terminologia vidpunkto la termino *objekto* estas pli konforma al la leĝo pri mallongeco ol la termino *objekta komplemento*.

3. Sekvas jena kritika noto:

«Estas interese, ke *PAGE* nomas komplementoj ĉiujn frazelementojn, krom la predikato kaj la subjekto! Tamen, poste, kiam preciziĝas la nomoj de la konkretaj partoj, oni forlasas tiun terminon kaj anstataŭigas ĝin per elpensitaj, neoficialaj. Sed la nekonsekvenco ne haltas en tiu ĉi punkto — ĉi tie kaj tie oni nomas ilin suplementoj. Per la sama nomo ja estas difinita speco de la epiteto! Por la lastaj oni enŝovas: *akcesoraj komplementoj*. Tia malkonsekvenco en la uzo de la terminoj estas malutila, embarasa».

Estas ege malfacile kapti la logikan fadenon de tiu ĉi kritika noto. Malklaras ĉu Oljanov aprobas aŭ malaprobas la ekziston de komuna nomo por ĉiuj frazelementoj krom la predikato kaj la subjekto. Oni devas supozi, ke li aprobas, ĉar nur tiam senciĝas liaj postaj riproĉoj, nome, ke post la fikso de la komuna nomo *PAGE* a) forlasas kaj anstataŭigas ĝin per elpensitaj, neoficialaj, kaj b) malkonsekvence uzas ĉi tiujn elpensitajn nomojn.

La sorto de la komuna nomo ĉiam estas tia, esti «forlasita» kaj «anstataŭigita» per la nomoj de la submetitaj sub ĝin nocioj, kiam oni aliras al ties pritrakto.

Kiaj estas la «oficialaj» nomoj de tiuj ĉi nocioj? Ili estas tiaj, kiajn la lingva komunaĵo akceptos. Kaj antaŭ ol esti akceptitaj ili devas esti «elpensitaj». Tio estas la tasko de ĉiu scienca verko, antaŭ ĉio de tia pionira verko, kia estas *PAGE*.

Kiaj estas la «elpensitaj» de *PAGE* nomoj? *Adjekto* kaj *objekto*, kiujn ni jam traktis. Ili estas kaptitaj per la komuna nomo *komplementoj*. Poste: *epiteto* kaj *suplemento* sub la komuna nomo *akcesoraj komplementoj*. Oni povas rekomendi, ke la komuna nomo de la unua grupo estu ne nur *komplementoj*, sed, ekzemple, *ĉefaj komplementoj* (aŭ *predikataj komplementoj*) por distingi ilin disde la *akcesoraj komplementoj* (*nepredikataj komplementoj*). Tiuokaze la nomo *komplementoj* restos nur kiel komuna nomo de ĉiuj frazelementoj krom la subjekto kaj la predikato. Oni povas diskuti ĉu iu frazelemento en konkreta frazo, donita kiel ekzemplo en *PAGE*, estas trafe klasigita aŭ ne. Tio tamen ne malpliigas la valoron de la proponita de *PAGE* terminologia sistemo.

Rilate al la riproĉita mikso inter epiteto kaj suplemento, evidentas, ke Oljanov ne sukcesis sekvi la subtilan analizon, kiun *PAGE* faras tiurilate.

Ni klarigu tion per ekzemplo. En la esprimo *domo de la reĝo* la vorto *reĝo* estas suplemento. La saman ideon tamen oni povas esprimi per la formo *reĝa domo*, do transformi la suplementon en epiteton. Do, oni ricevos epitete esprimitan suplementon. Sed en la esprimo *reĝa domo*, kie *reĝa* estas nur kvalito de la *domo* (impona, majesta), *reĝa* estas pura epiteto. Ĝi ne povas esti transformita al *domo de la reĝo*. Jen kie troviĝas la «mikso», riproĉata al *PAGE*.

4. «La aŭtoroj trovis akcepteblan terminon *prepozitivo* por esprimi vorton

kun prepozicio. Sed kial *prepozitiv-prepozitivo*?! Tio ja estas prepozitivo plus prepozicio. Do, pli ĝusta nomo estas *prepozici-prepozitivo* aŭ pli klare *prepozitivo kun prepozicio*, aŭ pli bone — *vorto kun du prepozicioj*.

Unue, laŭ PAGE, prepozitivo ne estas vorto kun prepozicio, kiel asertas Oljanov, sed substantivo kun prepozicio.

Prepozitivo estas laŭ PAGE, ekzemple, la esprimo *sub la tablo*. Per la termino *prepozitivo* la aŭtoroj de PAGE celas substreki, ke per la menciitaj tri morfologiaj elementoj estas kreita sintaksa bloko, kiu rajtas havi sian nomon. Kiam antaŭ tiu ĉi kunmetaĵo estas metita nova prepozicio, ekzemple. *el*, kaj la kunmetaĵo fariĝas *el sub la tablo*, konstruiĝas nova, pli granda bloko. La malnova, pli malgranda bloko, konservante sian propran blokan karakteron, estas ensorbita en la nova, pli granda bloko. Tiun ĉi novan blokon la aŭtoroj de PAGE celas esprimi per la termino *prepozitiv-prepozitivo*. Signi per aparta nomo la unuan fenomenon kaj ne doni nomon al la dua signifus iri duonan vojon.

La propono de Oljanov, ke estu «pli bone — vorto kun du prepozicioj», supezigas, ke, donante nuran morfologian karakterizon de la traktita kombinaĵo, li ne malkovras ties sintaksan karakteron. Se la supozo estas nepravigebla, tiam la difino «vorto kun du prepozicioj» estas neĝusta. «Vorto kun du prepozicioj» ne ekzistas. Al la «vorto» rilatas nur unu el la prepozicioj. La dua rilatas jam al la bloko, do ne nur al la «vorto».

5. Estas interesa jena kritika noto de Oljanov:

«Oni asertas, ke ĉar ŭ neniam formas apartan silabon, tial povas troviĝi nur post vokalo. Sed apartan silabon neniu konsonanto formas. Ĉu la sama regulo validas ankaŭ pri ili?!».

Tiu ĉi kritika noto estas interesa per tio, ke Oljanov, antaŭ ol kritiki, unue kreas kritikindan materialon. Li submetas al PAGE la ideon, ke ŭ estas konsonanto kaj poste kritikis PAGE pri la senbezona trakto de la ŭ-sono aparte disde la aliaj konsonantoj.

Laŭ PAGE ŭ ne estas konsonanto, sed duonvokalo. La aŭtoroj de PAGE eksplicite motivas sian koncepton. Pro tio PAGE konsideras necese aparte trakti ŭ kaj emfazi pri ties loko inter la aliaj literoj.

Fakte, eĉ se oni konceptus la ŭ-sonon kiel konsonanton, eĉ tiam necesus ties aparta trakto, ĉar tutsendubas, ke ĝi ne estas «ordinara» konsonanto.

6. Klarigante la uzon de *kiuj* kiel predikativo de *esti*, PAGE donas jenan ekzemplon: *Kiuj estas tiuj paperoj? Fakturoj.*

Oljanov malaprobas tion.

«Tie ĉi pli ĝusta estus *kio*. Al *kiuj* ni devus respondi kun artikolo: *la fakturoj*».

Oljanov malpravas. *Kio* estas plej ĝenerala demandilo. Per *kio* la demandanto deziras havi plej ĝeneralan informon pri io. Per *kio* tamen la demandanto intresiga pri la individueco de io. La supre menciita ekzemplo estas ekzemplo pri tia uzo de *kio*. La respondo al tia uzo de la demandpronomo ne povas esti akompanata de artikolo. Uzo de artikolo signifas, ke temas pri io jam menciita, jam konata. Kiam oni demandas pri la individueco, oni scias nenion pri ĝi. Jen pro kio oni ne povas uzi la artikolon. La korekteco de ĉi solvo povas esti facile

kontrolita, se ĉi-okaze oni donos plenan respondon al la demando: *Kiuj estas tiuj paperoj? Ili estas fakturoj (ne la fakturoj, kiel opinias Oljanov).*

7. «Ne estas konvinka la regulo pri uzo de artikolo, se ad-substantivo estas determinita per de-prepozitivo: *min tre ĉagrenas la perdiĝo de tiu letero*. En tiu ĉi ekzemplo la perdo certe estas konata. Sed se antaŭ *perdiĝo* ni metus epiteton, ekz. *eventuala perdiĝo (ia perdiĝo)?...* Evidente tio ĉi estas el la pluraj elpensitaj reguloj havantaj nenian sencon, krom kompliki simplajn aferojn».

PAGE rekomendas uzon de ad-substantivo kun artikolo en jenaj tri kazoj: kiam la esprimito estas jam konata; kiam la esprimito estas reprezentanto de tuta klaso aŭ kategorio; kiam, malgraŭ ke la esprimito ne estas konata kaj ne estas reprezentanto de tuta klaso aŭ kategorio, la ad-substantivo estas determinita per de-prepozitivo. Kiel ekzemplon pri la tria kazo *PAGE* donas la frazon: *min tre ĉagrenas la perdiĝo de tiu letero*.

Laŭ Oljanov, *la perdiĝo* en la donita ekzemplo estas konata, do la ekzemplo rilatas al la unua kazo kaj el tio sekvas, ke la tria kazo estas «elpensita», kion, plue, pravas ankaŭ la okazo, kiam «antaŭ *perdiĝo* ni metus epiteton, ekz. *eventuala perdiĝo (ia perdiĝo)*».

Forstreki la trian kazon pro tio, ke la donita ekzemplo rilatas ne al ĝi, sed al la unua kazo estas evidenta mallogikeco. La ekzemplo povas esti maltrafa, sed el tio ne sekvas, ke la tria kazo ne ekzistas. La maltrafa ekzemplo povas esti anstataŭigita per trafa.

Sed pro kio la ekzemplo pruvigas maltrafa? Ĉar Oljanov maltrafigas ĝin. Li submetas al *la perdiĝo* ideon, kion *PAGE* ne atribuas al ĝi. *PAGE* ekspluatas *nekonatan perdiĝon*. Oljanov tamen altrudas al ĝi *konatan perdiĝon*. Tiel, nature, la ekzemplo fariĝas maltrafa.

Rilate al la epitetita ad-substantivo ekzistas nenia problemo. *Eventuala perdiĝo* fariĝos *la eventuala perdiĝo*. Rilate al *ia perdiĝo* artikolo ne estas uzata, sed pro aliaj konsideroj, traktitaj en *PAGE*.

Estas konvinke, ke la uzo de artikolo ĉe ad-substantivoj ne povas esti limigita nur en la okazoj de *konateco* kaj *reprezentanteco*. La neceso por precizigo per artikolo ĉeestas ankaŭ en esprimoj kiel (laŭ *PAGE*) *la hirundoj anoncas la alvenon de printempo*, la jam traktita *min ĉagrenas la perdiĝo* (ne konata, kiel insistas Oljanov) *de tiu letero*, *min ĉagrenus la perdiĝo de letero*, *la irado de la aferoj*. Oni povas diskuti pri la amplekso de la proponita de *PAGE* tria regulo, sed oni ne povas nei ties neceson.

8. «Kial *nul horo* kaj ne *laŭregula — nula horo?*»

La kritika noto estas tiel redaktita kvazaŭ temas pri evidenta preseraro. Eraro ekzistas, kaj eĉ evidenta, sed en la kritika noto.

La ekzemplo, donita en *PAGE*, tekstas: *la ekflugo okazos je nul horo kaj dek kvin minutoj*. Se oni diros ne *nul horo*, sed *nula horo*, tio signifos uzi vicmontran numeralon. Tamen tio postulos vicmontrigi ankaŭ *dek kvin minutoj*. Kontraŭ *dek kvin minutoj* Oljanov ne protestas. Li protestas nur kontraŭ *nul horo*. Do, la unuan parton oni devas esprimi per vicmontra numeralo kaj la dua per baza numeralo. Ĉu tio estas logika?

Nul horo estas tiel laŭregula, kiel *nula horo*. *Nul* en *nul horo* estas baza numeralo kaj havas la saman ekzistrajton kiel *unu* en *unu horo*, kiel *du* en *du horoj* ktp. La aserto de Oljanov estas mikso inter bazaj kaj vicmontraj numeraloj.

9. «Tre nenature oni apartenigas *ambaŭ*, *lasta*, *fina* al la numeraloj». La frazo en *PAGE* tekstas:

«Al la numeraloj iel apartenas ankaŭ la apartaj adjektivoj *ambaŭ*, *lasta* kaj *fina*...».

Se Oljanov estus traleginta la adjekton *iel*, estus taŭge kompreninta la penson de *PAGE*. Fakte, rilate al *ambaŭ*, eĉ oni povas aserti, ke ĝi rekte apartenas al la numeraloj.

10. «*PAGE* parolas pri ses *akcesoraj* tempoj (krom la tri ĉefaj). Sed kiuj ili estas? Se temas pri la malsimplaj verbo-tempoj, ili estas 9 nur en aktivo kaj same tiom en pasivo, kaj ankoraŭ po 9 por la du voĉoj de la infinitivo, la imperativo kaj la kondicionalo.»

Do laŭ Oljanov, Esperanto havas 75 tempojn!

Apenaŭ povus ekzisti pli malbona propagando kontraŭ Esperanto ol la aserto, ke ĝi estas lingvo kun 75 tempoj.

Laŭ Oljanov, la tempoj en la aktivo malsamas al la tempoj en la pasivo. Malsameco ekzistas, sed ĝi ne estas inter la tempoj, sed inter ties formoj. Inter *mi estas batanta* kaj *mi estas batata* ekzistas nenia tempa diferenco. *Ambaŭ* estas en prezenco. Ne la tempo, la formoj estas malsamaj.

Laŭ Oljanov, ĉiu ŝanĝo en la partícipa elemento de la kompleksa tempo sekvigas ŝanĝon de la tempo. Tiel, laŭ Oljanov, *mi estas batinta* kaj *mi estas batanta* estas diversaj tempoj. Estas interese scii kiel oni nomu ilin. Ĉu oni devas nomi la unuan ekzemplon preterito?

Laŭ *PAGE*, ekzistas nur tri, nomitaj de ĝi, ĉefaj tempoj. Ili estas jenaj:

PREZENC0

1. -as (voĉo aktiva, modo indikativa, nenuancigite); estas -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo indikativa, nuancigite); estas -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo indikativa, nuancigite).

2. -us (voĉo aktiva, modo kondicionala, nenuancigite); estus -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo kondicionala, nuancigite); estus -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo kondicionala, nuancigite).

2. -u (voĉo aktiva, modo imperativa, nenuancigite); estu -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo imperativa, nuancigite); estu -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo imperativa, nuancigite).

4. -i (voĉo aktiva, modo infinitiva, nenuancigite); esti -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo infinitiva, nuancigite); esti -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo infinitiva, nuancigite).

5. -ant- (voĉo aktiva, modo partícipa); -at- (voĉo pasiva, modo partícipa).

PRETERITO

1. -is (voĉo aktiva, modo indikativa, nenuancigite); estis -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo indikativa, nuancigite); estis -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo indikativa, nuancigite).

2. -us (voĉo aktiva, modo kondicionala, nenuancigite); estus -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo kondicionala, nuancigite); estus -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo kondicionala, nuancigite).

3. -u (voĉo aktiva, modo imperativa, nenuancigite); estu -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo imperativa, nuancigite); estu -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo imperativa, nuancigite).

4. -i (voĉo aktiva, modo infinitiva, nenuancigite); esti -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo infinitiva, nuancigite); esti -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo infinitiva, nuancigite).

5. -int- (voĉo aktiva, modo participa); -it- (voĉo pasiva, modo participa).

FUTURO

1. -os (voĉo aktiva, modo indikativa, nenuancigite); estos -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo indikativa, nuancigite); estos -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo indikativa, nuancigite).

2. -us (voĉo aktiva, modo kondicionala, nenuancigite); estus -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo kondicionala, nuancigite); estus -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo kondicionala, nuancigite).

3. -u (voĉo aktiva, modo imperativa, nenuancigite); estu -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo imperativa, nuancigite); estu -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo imperativa, nuancigite).

4. -i (voĉo aktiva, modo infinitiva, nenuancigite); esti -anta, -inta, -onta (voĉo aktiva, modo infinitiva, nuancigite); esti -ata, -ita, -ota (voĉo pasiva, modo infinitiva, nuancigite).

5. -ont- (voĉo aktiva, modo participa); -ot- (voĉo pasiva, modo participa).

Kiel vidite, ĉiu el la modoj kondicionala, imperativa kaj infinitiva esprimas la tri «ĉefajn» tempojn per formoj, kiuj ne varias laŭ la tempo. Fakte, ili per si mem ne povas esprimi la tempojn. Por tio ili bezonas la helpon de la kunteksto. Por emfazi jen ĉi tiun ties specifecon *PAGE* nomas ilin «akcesoraj» malgraŭ ke ili estas santempe «ĉefaj», ĉar ili ne estas ekster la ĝenerala sistemo de la «ĉefaj» tempoj. Al tiuj ĉi tri «akcesoraj tempoj» *PAGE* aligas la tri formojn de la participo, ĉar ankaŭ ili, malgraŭ ke ili havas markilon pri tempo, ne povas esprimi la tempon sen helpo de «kunteksto». Jen la ses «akcesoraj tempoj», pri kiuj demandas Oljanov.

La proponita de *PAGE* sistemo de tempoj estas simpla kaj plena, kio estas ege grava el vidpunkto de la bezonoj de la instruado.

11. «Estas miksitaj la nocioj: ag-verbo kaj transitiva verbo. Ne ĉiu ag-verbo estas transitiva».

Tiu ĉi kritika noto estas frapanta misprezento de la koncepto de *PAGE*.

Jen kion skribas tiurilate *PAGE*:

«Inter la ag-verboj oni devas fari... distingon. Nome el agoj, iuj celas, atingas, koncernas personon aŭ aferon... Tiujn ag-verbojn oni nomas transitivaj... Aliaj estas, male, direktitaj kontraŭ neniu aŭ nenio... Tiujn ag-verbojn oni nomas netransitivaj».

12. «Malĝuste *PAGE* klarigas la ne-uzon de akuzativo post prepozicioj *de*, *el*, *preter*, *al*, *ĝis*, ĉar ili per si mem jam sufiĉe esprimas la movon. Tie ĉi malprave identiĝas la demovaj kun la almovaj prepozicioj *al* kaj *ĝis*. Nur al tiuj lastaj rilatas la klarigo. En la aliaj okazoj oni ne uzas akuzativon ne pro ĉeesto de la montritaj prepozicioj. Tia aserto kontraŭas al la skribitaĵo komence de la sama paragrafo, ke la akuzativo ne dependas de la uzo de tiu aŭ alia prepozicio, de tiu aŭ alia verbo, sed nur de la esprimota ideo: de tio, ĉu la prepozicio estas vera celo (direkto) de la movo aŭ ne. Kaj ĉar la demovaj prepozicioj ne montras la celon, la finan punkton, sed nur la komencon de la movo (de, el), eĉ se ni forigus la prepoziciojn, ni ne rajtas akuzativigi la substantivon».

Kerno de tiu ĉi kritika noto estas, evidente, la riproĉo, ke *PAGE* kontraŭe klarigas la uzon de la akuzativo kiel mov- kaj celesprimilo. La kontraŭeco, laŭ Oljanov, konsistas en tio, ke, unuflanke, *PAGE* asertas, ke nur la esprimata ideo estas tiu faktoro, kiu determinas, ĉu devas esti uzata la akuzativo, kaj, aliflanke, dependigas la akuzativon de certaj prepozicioj.

Ĉu veras la riproĉo?

Estas etnaj lingvoj, diras *PAGE*, en kiuj ekzistas akuzativaj prepozicioj, t. e. prepozicioj, kiuj postulas post si akuzativon. Post tia prepozicio la parolanto estas devigita uzi akuzativon. Li ne interesiĝas pri la esprimata ideo. Pri tio zorgas la lingvo, ne la parolo. La lingvo solvas la problemon kaj kreas la preskribon, al kiu la parolanto devas subiĝi.

En Esperanto ne estas tiel. En Esperanto la problemo estas parola. La parolanto en la proceso de la parolo devas solvi ĝin. La kriterio estas: la esprimata ideo.

Sed, se estas tiel, demandas Oljanov, pro kio *PAGE* dependigas la akuzativon de certaj prepozicioj?

PAGE ne dependigas la akuzativon de la fakto de ĉeesto de la koncernaj prepozicioj, sed de la esprimata per la prepozicioj ideo. Ankaŭ la prepozicioj havas semantikan valoron, havas «ideojn». *PAGE* faras analizon de la semantika valoro de la prepozicioj por malkovri ties ideojn. Do, la riproĉata dependigo estas tutkonforma al la koncepto de *PAGE*.

Fakte, asertante, ke «en la aliaj okazoj oni ne uzas akuzativon ne pro ĉeesto de la montritaj prepozicioj» (temas pri la prepozicioj *de* kaj *el*), Oljanov aliĝas al la koncepto de *PAGE*, ĉar, se «oni ne uzas akuzativon ne pro ĉeesto de la montritaj prepozicioj», tiam pro iu alia «ĉeesto», pro «ĉeesto» de la esprimata ideo.

Sed pro kio *PAGE* identiĝas *de*, *el* kun *al*, *ĝis*, demandas Oljanov.

PAGE identiĝas ilin rilate al ties karaktero de movaj prepozicioj. Ĉu tio ne estas vera? Ne gravas la diversa direkto de la movo. Gravas, ke ili estas movaj kaj tiu ties komuna karaktero unuigas ilin en komunan genron.

Laŭ *PAGE*, la akuzativo estas necesa por esprimi la ideojn pri movo kaj celo. Ĉar la traktataj prepozicioj esprimas la ideon pri movo, malnecesas ripeti la esprimon de la sama ideo per akuzativo. Sed la prepozicioj *de* kaj *el*, replikas Oljanov, ne esprimas ideon pri celo, do la uzo de akuzativo ne estos ripeto de jam esprimita ideo. Ĉu el tio sekvas, ke post *de* kaj *el* oni povas uzi akuzativon?

La repliko fontas el la malprava koncepto, ke la almovaj prepozicioj esprimas ideon pri celo (temas pri tiu specifa celo, realigata ĉe la ĉi tie traktata fenomeno), dum la demovaj prepozicioj ne esprimas tian ideon.

Ne nur la demovaj, sed ankaŭ la almovaj prepozicioj ne esprimas la celon. Ili esprimas nur movon. La esprimo de la direkto «al la celo» ne estas esprimo de la celo. La esprimo de la celo estas propraĵo nur de la akuzativo. Elokventa pruvo pri tio estas la fakto, ke la akuzativo povas esprimi la celon ankaŭ sen prepozicioj.

Kaj, fine, la penso «ĉe se ni forigus la prepoziciojn, ni ne rajtas akuzativigi la substantivon» estas malklara. Sen prepozicioj la akuzativo estas tutebla. Dependas de la esprimita ideo.

13. «Malfacile oni povas ekkredi, ke *ĉiujare kunveni, tutmonde okazi, iri en direkto de...*, ekzisti nur en la *fabelo* estas manier-indikaj adjektoj».

Tiuspeca kritiko montras klare, kiom malutilas al la elasta, viva parolo la strebo ĉirkaŭigi la vortojn per rigidaj muroj. Kiel «ekkrede», ke temas pri manier-indikaj adjektoj, kiam la esprimoj entenas vortojn kiel *ĉiujare, tutmonde, direkto, ekzisti... en*.

La ekkredo estas facila, se oni liberiĝos de la koŝmaro de la unusignifeco.

Kiam oni diras, ke la asocio decidis kunveni ne kvarjare, sed ĉiujare, tio estas indiko pri maniero de agado de la asocio. Se oni diras, ke hodiaŭ la batalo por paco okazas jam ne regione, sed tutmonde, ne estas malfacile kompreni, ke oni indikas ne la lokon, sed la manieron de batalo. Manier-indikan karakteron de *iri en direkto de* oni povas malkovri en la frazo: la plej bona maniero de orientado estas iri en direkto de la kompasoj. Kaj, fine, la frazo *ekzisti nur en la fabelo* estas ofte maniero de prezento de la nerealigeblaĵo.

14. «La aserto, ke ĉiu verbo povas esti uzata transitive, estas rekte erariga».

Oljanov malĝuste citas la aserton de *PAGE*.

PAGE skribas:

«La transitiva uzebleco de la verboj estas en Esperanto pli larĝa ol en la naciaj lingvoj ĝenerale: oni povas diri, ke ĉiu verbo povas esti uzata transitive, se la tiel formulita esprimo povas havi sencon».

Do, ne «ĉiu verbo», kiel diras Oljanov, sed «ĉiu verbo... se...».

La tiel formulita de *PAGE* ideo estas unu el la plej produktivaj ideoj, kiujn *PAGE* prezentas. Ĝi estas solida ponto inter la diversaj etnaroj en ties Esperanto-komunikado. Ĝi forigas unu el la barieroj, kiujn iuj gramatikistoj starigas sur la vojo al pli facila adopto de la lingvo. Ne per kritiko, sed per laŭdo oni devas renkonti la prezentitan de *PAGE* ideon.

15. «*Oni elektis lin kiel prezidanton* — estas nomita elipsa frazo. En postaj paragrafoj (175, 197) oni neas, ke tiaj frazoj estas elipsaj (ĉe estas prezentita la sama ekzemplo)».

Tiu ĉi kritika noto starigas la demandojn, ĉu Oljanov tralegis la kritikatajn tekstojn kaj se tralegis ĉu komprenis ilin. PAGE dediĉas al la klarigo de *kiel* preskaŭ tutan paĝon. «*Kiel* havas en Esperanto du funkciojn sence preskaŭ kontraŭajn: komparan kaj identigan». La frazo *oni elektis lin kiel prezidanton* estas nekomprenebla sen la helpo de la kunteksto, ĉar oni ne scias kian funkcion plenumas *kiel*. Se *kiel* plenumas komparan funkcion, la frazo estas elipsa frazo de la plena frazo: *Oni elektis lin tiel kiel oni elektas prezidanton*. Tiusence estas la unua citita de Oljanov ekzemplo. Se *kiel* plenumas la identigan funkcion, tiam la frazo ne estas elipsa, sed plena frazo kaj signifas: *Oni elektis lin por prezidanto*. En tiu ĉi senco estas la dua citita de Oljanov ekzemplo. Por eviti malklarecon PAGE proponas uzi, se temas pri objekta stat-adjekto, *por* (oni elektis lin por prezidanto) aŭ, se temas pri subjekta stat-adjekto, *estante* (li laboregis penege, estante lignohakisto) aŭ predikativon (oni elektis lin prezidanto).

16. «*La modaloj estas la diversaj formoj, kiujn la verbo alprenas laŭ tio, ĉu ĝi rolas kiel predikato aŭ kiel substantivo aŭ kiel adjektivo*. Miksiĝas sintaksaj kaj morfologiaj kategorioj».

Kio estas tio: «miksiĝas sintaksaj kaj morfologiaj kategorioj»? *Miksi* signifas «preni unu objekton por alia» (PIV). Ĉu PAGE prenas sintaksajn kategoriojn por morfologiaj aŭ morfologiajn por sintaksaj? Evidente ne. PAGE nur asertas, ke la formoj, kiujn la verbo alprenas, estas predikato (PIV parolas pri *pura verbo* aŭ *finitivo*) aŭ substantivo (PIV: *kvazaŭsubstantivo* aŭ *infinitivo*) aŭ adjektivo (PIV: *kvazaŭadjektivo* aŭ *participo*). Eble Oljanov deziras, ke la difino estu prezentita aŭ nur en sintaksaj aŭ nur en morfologiaj kategorioj? Sed ĉu la modaloj «konsentus»? La difino ne estas stampo, kiun oni metas laŭplaĉe. Ĝi estas malkovro de la eco de la fenomeno kaj se tiu ĉi eco estas sintaks-morfologia?

17. «*Subjekto anstataŭ plenumanto de la ago. Tio povas erarigi la legantojn miksante la faktan plenumanton kun gramatika subjekto de la propozicio*».

Temas pri la faktitiva voĉo. PAGE skribas: «En la faktitivo do troviĝas du agoj: la ago kaŭzanta kaj la ago kaŭzata». Tio signifas, ke ekzistas du agantoj. El gramatika vidpunkto — du propozicioj kun du subjektoj. La faktitiva voĉo reduktas la du propoziciojn al unu konservante al la unua aganto lian gramatikan funkcion kaj senigante la duan aganton de lia gramatika funkcio. Do, rezulte, restas unu propozicio kun du agantoj kaj kun unu subjekto. La dua aganto, ĉar lia ago estas kaŭzata, povas esti nomata plenumanto. Jen tiel PAGE prezentas la fenomenon. Kio en tiu ĉi prezento estas riproĉinda? Pri kia «mikso» parolas Oljanov?

18. «*Al-adjekto anst. nereкта objekto (pagigi al iu monon)*».

Evidente, Oljanov identigas la statuson de *iu* en la frazo *pagi al iu* kun la statuso de *iu* en la frazo *pagigi al iu* (la donita de PAGE ekzemplo estas: *pagigi al iu per la banko*).

Logike la frazon *pagigi al iu per la banko* oni povas esprimi jene (ni uzu unuan personon): *mi pagigis la bankon al iu*. Tio signifas, ke mi ordonis al la banko pagi al iu. Fakte, la banko ne *pagas*. Ĝi nur plenumas mian ordonon. Paganto estas mi. Sed inter mi kiel paganto kaj *iu* staras la banko kaj pro tio mia

pago ne povas ligiĝi kun *iu*. *Iu* estas ligita kun la banko, kiu tamen ne estas la paganto. *Iu* estas la persono, al kiu estas direktita la plenumo de la devo de la banko. Do, tiu ĉi *iu*, gramatike, ne estas adresato de *pagi*, sed de *igi*. Pro tio, konsekvence, *PAGE* nomas ĝin al-adjekto.

19. «En la propozicio *pli bone estus esti nenaskita* oni nomas la infinitivon *esti* infinitiva komplemento; ĝi fakte estas *subjekto*».

Propre, *esti* ne povas funkcii kiel subjekto, ĉar, ĉi-okaze, ĝi estas kopulo. Kaj kopulo ne povas roli kiel subjekto. Subjekto estas «la io, pri kiu oni asertas ion» (*PAGE*). Tio, pri kiu la traktita frazo asertas ion, estas nek *esti*, nek *nenaskita*, sed la «*pli bone*». *Esti nenaskita* estas «tio, kion oni asertas» (*PAGE*).

20. «§ 179. Titolita *ablativa objekto* (kiel vi vidas — abunda produktado de terminoj!) kaj post la difino sekvas la frazo: *Tiun objekton tamen pli ĝuste estas rigardi ablativa adjekto* (?!). Estas necesa strikta determino kaj disdivido de la gramatikaj kategorioj. Ne povas esti tio, kaj samtempe alio».

La kritika noto aŭ estas manipulo aŭ estas malkompreno. *PAGE* sin demandas, kiel kvalifiki la komplementon al la verboj *apartiĝi*, *diferenci*, *disiĝi*, *distingiĝi*, *kaŝiĝi*, *liberiĝi*, *saviĝi*, *seniĝi*. Ĉu kiel ablativan objekton, ĉu kiel ablativan adjekton. Kaj inklinas («*pli ĝuste estas*») al ablativa adjekto. Ne temas pri «strikta determino kaj disdivido de la gramatikaj kategorioj». Tiajn *determinojn* kaj *disdividojn* *PAGE* aliloke donas. Temas pri tio, kiel kvalifiki la komplementojn al la *menciitaj verboj*.

21. «*Li havis nur la pugnojn kiel armilojn*. Malfacile oni povus akcepti, ke la cirkonstanca komplemento post *kiel* estas predikativo».

Evidentas, ke Oljanov ne sukcesis en sia analizo, se li faris tian.

Kiam oni diras *li havis pugnojn kiel armilojn*, tiam *armilojn* estas cirkonstanca komplemento, pli ĝuste statindika adjekto, ĉar *armilojn* montras la staton de *pugnojn*. La adjekto informas nin, ke la pugnoj estas fortikaj kiel armiloj.

Kiam, tamen, oni diras *li havis nur la pugnojn kiel armilojn*, tiam *armilojn* ne informas nin pri la stato de *pugnojn*, ĉu ili estas fortikaj aŭ malfortikaj, sed pri ties funkcio. Se oni prezentos la frazon en analiza formo, oni devos diri: *li havis nur pugnojn*. Ili estis liaj ununuraj armiloj. Jen pro kio *armilojn* en la traktata frazo estas nereкта objekta predikativo, sed ne cirkonstanca komplemento (adjekto) kiel asertas Oljanov.

22. «*Oni povas uzi anstataŭ stat-adjekto ankaŭ adverbon* — denove mikso de sintaksa kategorio kun morfologia (adverbo)!»

Ne mikso, sed *lapsus calami*, kion vidigas la donita ekzemplo. La ideo estas, ke anstataŭ per substantivo la stat-adjekto povas esti esprimita per adverbo. Anstataŭ uzi la substantiv-adjekton *en libero* en la frazo *danĝere estas lasi lin en libero* oni povas diri *danĝere estas lasi lin libere*.

23. «Mikso de rezultaj adjektoj kaj predikativoj».

PAGE skribas:

«Se la adjekt-substantivo esprimas funkciulon, profesiulon, la rezultadjekto

devas esti esprimata per predikativo rekta aŭ nereakta: *nomumi iun instruisto, elekti iun prezidanto aŭ nomumi iun kiel instruiston, elekti iun kiel prezidanton*».

Klaras, ke la kialo de la kritika noto de Oljanov estas la frazo «la rezultad-jekto devas esti esprimata per predikativo».

Vere, tiu ĉi frazo kritikendas. Neniu gramatika kategorio esprimas alian gramatikan kategorion. Ĉiu gramatika kategorio esprimas nur sin mem. Ne povas, ekzemple, la subjekto esprimi la predikaton, nek la predikato — la subjekton. Ne povas la predikativo esprimi la adjekton. Evidente, la frazo «la rezultad-jekto devas esti esprimata per predikativo» ne adekvatas al la ĉi-supra principo. Ĉu tamen pro mikso de la gramatikaj kategorioj? Post la farita de PAGE tre detala analizo de la gramatikaj kategorioj, speciale de la rezultad-jekto kaj de la predikativo, la supozo pri mikso estas nete nepraviga. La traktata frazo, kaj aliaj similaj aliloke, evidente estas rezulto de la strebo de PAGE atingi koncizecon de la esprimo. La «peko», ĉu pardonebla aŭ nepardonebla, havas nenion komunan kun la mikso.

24. «*Mi vidis lin ŝteli*. Oni asertas, ke oni povas tiajn formojn anstataŭigi ankaŭ per objekta predikativo. Sed ja la infinitivo estas ankaŭ objekta predikativo».

Oljanov eraras. Ŝteli estas objekto, ne predikativo. Ĉi-okaze PAGE montras transformiĝon de objekto en predikativon.

Kiel okazas tio? *Mi vidis lin ŝteli* konsistas el du propozicioj, nome *mi vidis* (ĉefpropozicio), ke *li ŝtelas* (subpropozicio). La subpropozicio estas objekta, ĉar respondas al la demando *kion mi vidis*. Tiun ĉi objektan subpropozicion oni povas prezenti per *ŝteli*, do per *mi vidis lin ŝteli*, kie *ŝteli* estas objekto (samtempe la subjekto de la subpropozicio *li fariĝas objekto*). La sekva transformo, kiun koncernas la noto de Oljanov, estas la transformo de la objekto *ŝteli* en predikativon (objektan) *ŝtelanta*: *Mi vidis lin ŝtelanta*. Jen kiel la infinitiva objekto transformiĝas en objektan predikativon. Oljanov ne faris la ĉi-supran analizon.

25. «Stranga miksiĝo de diversspecaj subpropozicioj».

Temas pri paragrafo 257. En tiu ĉi paragrafo PAGE traktas la supozajn (aŭ kondiĉajn) subpropoziciojn, t. e. la subpropoziciojn, kiuj «indikas ion, kio estas necesa kondiĉo por la efektiviĝo de la ĉefpropozicia enhavo». Laŭ PAGE, kvar estas la kazoj, per kiuj realiĝas tiuj ĉi propozicioj: reala (ĉar vi bone faris vian taskon, mi vin rekompencos), *teoria* (se oni faras sian taskon, oni estos rekompencata), *ebla* (se vi faris vian taskon, mi vin rekompencos) kaj *fiktiva* (se vi estus farinta vian taskon, mi vin rekompencos).

Kie troviĝas la «stranga miksiĝo de diversspecaj subpropozicioj»? Ĉu en tio, ke sub unu tegmenton estas loĝigitaj la reala kaj la fiktiva kazoj? Sed ilin unuigas la komuna ideo, ke ambaŭ estas «necesa kondiĉo por la efektiviĝo de la ĉefpropozicia enhavo».

26. «Specialaĵo de pri- estas, ke ĝi, kiel prefiksoido respondas ne nur al la prepozicio pri, sed al ĉiuj prepozicioj, kiuj formas nerektajn objektojn (demovaj: de, el [ĉu nerektaj objektoj?! — notoj miaj] almovaj: al, por). Tiujn nerektajn

objekton ni nomas adjektoj koncernaj... Fakte post demovaj de, el sekvas lokadjektoj movaj (§ 190)!?».

Kion kritikas Oljanov? Ĉu nur la aserton, ke per *de* kaj *el* oni povas formi nerektajn objektojn aŭ ankaŭ la «mikson» inter nerektaj objektoj kaj lokadjektoj, resp. inter nerektaj objektoj kaj koncernaj adjektoj?

Per *de* kaj *el* oni povas formi nerektajn objektojn. *PAGE* donas abundon da ekzemploj: *aĉeti, akcepti, apartigi, deteni, diferencigi, disigi, distingigi, gardi, kaŝi, liberigi, preni, rabi, savi, senigi, ŝirmi, ŝteli* ion (iun) de io (de iu). Se la esprimata ideo postulas, *de* povas esti anstataŭigata de *el*.

Sed pro kio, replikas Oljanov, traktante la lokadjektojn demovajn *PAGE* asertas, ke per *de* kaj *el* oni formas lokadjektojn movajn?

Ĉar *de* kaj *el* vere formas lokadjektojn movajn. La prepozicioj *de* kaj *el* estas uzataj ne nur por formi lokadjektojn, sed ankaŭ por formi nerektajn objektojn.

Kaj fine pri la «mikso» inter objektoj kaj adjektoj. Vere, tia «mikso» ekzistas. Sed pri ĝi kulpas ne *PAGE*, sed la parolo. La parolo, resp. la kunteksto, dum la proceso de realigo de la lingvo, estas la granda «miksanto». Nur ĝi povas respondi, ekzemple, al la demando, ĉu *pri io* post la verboj *ĝoji, silenti, mediti, certi, pravi, kontenti* estas nereкта objekto aŭ adjekto. Jen pro kio *PAGE* notas: «Pro pure praktikaj motivoj, ni pritraktos la prepozitivojn enkondukitajn per *pri, al, de* (kiam ili signas tion, kion la ago koncernas) inter la nerektaj objektoj, kaj ĉiujn aliajn inter la adjektoj» (§ 176).

27. «La komplika regularo por transliniigo».

En kio konsistas la komplikeco?

PAGE rekomendas dividi la vortojn, kiuj konsistas el pluraj gramatikaj partoj, laŭ tiuj partoj (escepte de la finaĵoj). Se temas pri la unuradikaj vortoj, laŭ la silabado. Jen la tuta komplikeco. Nature, dividi laŭ la silabado premisas konon pri tio, kio estas silabo. Ĉu tamen tia postulo estas troa al homoj, kiuj deziras ekposedi la Esperantan skribon?

28. «Kaj la elsuĉaĵo pri multaj gramatikaj kazoj (elativo, terminativo ktp)».

Jen kion diras *PAGE*:

«Propre oni povus distingi tiom da kazoj, kiom da prepozicioj ekzistas en la lingvo: genitivo (*de*), dativo (*al*), instrumentalo (*per*), elativo (*el*), terminativo (*ĝis*), sociativo (*kun*), komitativo (*kune kun*), privativo (*sen*), kaŭzalo (*pro*), finalo (*por*) ktp. Sed tio estus nur balasto. Pli simple estas paroli pri de-prepozitivo, al-prepozitivo, per-prepozitivo ktp».

Ĉu la noto de Oljanov orientas aŭ misorientas la leganton?

29. «Ĉu iu kredas, ke homoj, en kies nacia lingvo ne estas konataj vasteco kaj longeco de vokaloj post tralego de la malsimpla plektaĵo de reguloj komencos prononci laŭ ties direktivo?».

Tiu ĉi demando povas esti perifrazita tiel: ĉu iu kredas, ke homoj, en kies nacia lingvo ne ekzistas Esperantaj vortoj kaj Esperantaj reguloj, povas ellerni Esperanton?

Estas homoj, en kies nacia lingvo ne ekzistas la konsonantoj *r* kaj *l*. Ĉu al ili oni ne devas instrui ĉi tiujn konsonantojn?

Fakte, ĝuste por tiuj homoj, «en kies nacia lingvo ne estas konataj vasteco kaj longeco de vokaloj», estas duoble pli necese trakti la problemojn pri vasteco kaj longeco de la vokaloj. La vasteco kaj la longeco ne estas nur ornamoj de la parolo. Ili ofte havas gravan komunikecan valoron.

30. «La konsiloj pri -ita, -ata estas tiel embarasaj, ke apenaŭ iu povus praktike utiligi ilin».

PAGE konsilas, por korekta uzo de -ita, -ata, atenti pri jenaj aspektoj de la verbo: 1) daŭro sen rezulto, kaj 2) daŭro kun rezulto.

Ekzemple:

La aspekto de *koni* estas daŭro sen rezulto. La konsilo de PAGE: uzu -ata.

Do: li estas konata. Li estis konata.

La verbo *konstrui* havas ambaŭ aspektojn. Se oni uzas la verbon kun la unua aspekto (daŭro sen rezulto) validas la sama konsilo: usu -ata. Do: la domo estas konstruata. La domo estis konstruata.

Se oni uzas la verbon kun la dua aspekto (daŭro kun rezulto) PAGE konsilas: uzu -ita. Do: la domo estas konstruita. La domo estis konstruita.

Por kontrolo PAGE rekomendas jenon:

Transformu la pasivan formon en aktivan kaj aldonu -ad. Se la senco restas la sama, uzu la formon -ata. Se la senco ŝanĝiĝas, uzu la formon -ita.

Ekzemple:

Li estas (estis) konata. Oni konadas (konadis) lin. La senco estas la sama. Do: la formo -ata.

La domo estas (estis) konstruata. Oni konstruadas (konstruadis) la domon. La senco estas la sama. Do: la formo -ata.

La domo estas (estis) konstruita. Oni konstruadas (konstruadis) la domon. La senco ne estas la sama. Do: la formo -ita.

Ĉu la konsiloj ne estas utilaj? Kaj ĉu oni povas diri, ke ili «estas tiel embarasaj, ke apenaŭ iu povus praktike utiligi ilin»?

31. Multaj el la kritikaj notoj de Oljanov estas nuraj deklaroj, ke li kvalifikas negative la kernan koncepton:

Jen tia:

«Kaj la mirinde kaptorna plektaĵo de terminoj rilate la objektan komplementon».

Kritiko, kiu kontentiĝas nur per tio, kvalifiki negative ian koncepton, malhavas la rajton pretendi, ke estas scienca kritiko. La negativa kvalifiko, resp. la kvalifiko *kaptorna* provas nur, ke la kritikita koncepto ne plaĉas al la kritikanto, resp. «turnas» lian kapon, sed ne ke ĝi malhavas sciencan valoron.

Fakte, ne estas klare, pri kio malkonsentas Oljanov, ĉu pri la konstato de PAGE, ke ekzistas la fenomenoj, ĉu pri la sistemo, per kiu ili estas prezentitaj, ĉu pri la terminoj, kiuj estas donitaj.

PAGE konstatas, ke, unue, diversaj estas la formoj de la objektoj, due, ke inter la verboj kaj la objektoj ekzistas diversaj «parencaj» rilatoj, kaj, trie, ke la

ligo inter la verbo kaj la objekto povas esti rekta aŭ nereкта. Sur tiuj ĉi tri konstatoj *PAGE* konstruas la proponitan sistemon kaj donas koncernajn terminojn al ĉiu el ties eroj. El vidpunkto de la unua konstato la objektoj estas substantivaj kaj infinitivaj. El vidpunkto de la dua konstato la objektoj estas fiksjaj, alternaj kaj diversaj (responde al kio la verboj estas fiksojektaj, alternobjektaj kaj diversobjektaj). El vidpunkto de la tria konstato la objektoj estas rektaj kaj nerektaj. La nerektaj, siaflanke, manifestiĝas kiel pri-objektoj (traktativaj), al-objektoj (dativaj) kaj de-objektoj (ablativaj).

La «kulpo» de *PAGE* estas, ke ĝi vidis la fenomenojn, prezentis ilin en sistemon kaj donis al ili koncernajn nomojn.

32. «Tralegu la difinojn de propozicio kaj frazo sur paĝo 290 kaj provu kompreni ilin post la unua tralego! Vane! Tiajn elturnitajn difinojn en naciaj gramatikoj mi ne renkontis ĝis nun».

La kritika noto estas tia, ke oni malfacile povas kompreni ĝin eĉ post kelkaj tralegoj.

Kion kritikas Oljanov?

Ĉu la donitaj de *PAGE* difinoj estas malĝustaj? En la unua frazo li nur asertas, ke oni ne povas kompreni ilin «post la unua tralego». Do, post la dua tralego oni komprenos ilin. Sed sekvas *vane* kaj la kvalifiko *elturnitaj difinoj*. Al la kvalifiko *elturnitaj difinoj* Oljanov, evidente, atribuas la signifon *misaj, eraraj* kaj tiom eraraj, kian gradon la naciaj gramatikoj ĝis nun ne atingis.

Jen la kritikitaj difinoj:

Propozicio estas analiza dismeto de kompleksa aga aŭ stata koncepto en sintakse interrilatajn detal-konceptojn, kiuj formas fermitan unuon, necesigantan la esprimon de tempo kaj modo.

Frazo estas dismeto de sence kompleta, memstara kompleksa koncepto en sintakse interrilatajn detal-konceptojn.

Tutnature, por kompreni ĉi suprajn difinojn post la unua tralego necesas granda preparlaboro. Sed tio estas necesa ĉe ĉiuj sciencaj difinoj. Finfine, povas esti uzataj ankaŭ pliaj tralegoj kaj utiligataj la prezentitaj de *PAGE* ekzemploj, kiuj signife helpas la komprenon.

33. «Paĝoj 271-273 prezentas veran ĝangalon, en kiu la leganto perdiĝas». Nu, ni eniru en la «ĝangalon» kaj risku «perdiĝon».

Sur tiuj ĉi paĝoj *PAGE* traktas la statindikajn, kondiĉajn kaj koncedajn adjektojn.

La statintikaj adjektoj estas tiuj adjektoj, kiuj montras «en kia stato troviĝas la objekto aŭ la subjekto», do la rilatato.

Kaj *PAGE* klarigas:

Estas adjektoj, kiuj montras la «materialon» de la rilatato (lia biblioteko konsistas *el modernaj romanoj*), la konsistajn partojn, la kvanton aŭ la tutan rilataton (la neĝo falas *en grandaj flokoj*, li aĉetis librojn *en granda nombro*, li venis *en sia propra persono*) aŭ identiĝas al la rilatato (li venis *kiel delegito*). Tiujn ĉi funkciojn *PAGE* nomas identigaj.

Estas adjektoj, kiuj montras la cirkonstancon (ili sidis *en vigla interparolado*)

aŭ la funkcion (li ludas *en la rolo* de...). Tiujn ĉi funkciojn PAGE nomas rilatigaj.

Poste sekvas klarigo pri la kondiĉaj adjektoj. «Ili esprimas la staton de la subjekto aŭ objekto kaj samtempe ankaŭ tion, ke tiu stato influas la agon favore».

Ankaŭ ili efektiviĝas en identiga funkcio (oni petis lin, *kiel prezidanton*, ke li intervenu) kaj en rilatiga funkcio (*ĉe ekzistado de lingvo internacia* ĉiuj tradukoj estus farataj nur en tiun ĉi lastan, *ĉe lia lerteco* oni povas konfidi al li la taskon).

Kaj fine klarigo pri la koncedaj adjektoj. «Ili esprimas la staton malfavore, do la ago okazas *mlagraŭ ĝi*».

Ili ankaŭ aperas en identiga funkcio, kiu estas esprimebla nur per konceda subpropozicio (mi amas lin, *kvankam li estas sentaŭgulo*), kaj en rilatiga (*ĉe mia plej bona volo* mi ne povas alkitimiĝi, mi pacience eltenis *malgrau la multaj atakoj*, *spite ĉiujn argumentojn* li rifuzis).

Jen la «ĝangalo», pri kiu plendas Oljanov.

Vere, oni povas sin demandi, pro kio estas necesa la prezentita tiel detale ellaborita sistemo de la adjektoj, ne nur la statindikaj, sed ĉiuj.

La sistemigo de la konoj estas la unua postulo al la scienco. Fakte, la alia nomo de la scienco estas: sistemo. Tio tamen, kio karakterizas la strebon de PAGE prezenti detale ellaboritan sistemon de la adjektoj, ne estas nur la celo plenumi la fundamentan postulon al ĉiu scienca esploro, sed ankaŭ la celo starigi «ordon» ĉe la uzo de la prepozicioj. Oni povas supozi eĉ, ke la unua celo estis submetita al la dua. Tio plialtigas la valoron de la prezentita de PAGE sistemo, konsiderante la unuarangan gravecon de la unuecigo de la prepozici-uzo.

34. «Nu, pensis mi, jen jam mi venas al la parto pri la vortfarado kaj fine mi eliros el la ĝangaloj kaj ekpromenos en la helaj aleoj de la simpla, interesa kaj agrabla Esperanta vortfarado. Ho ve! Evidentiĝis tute alio. Tie ĉi ankaŭ senfinaj terminoj, subterminoj, terminoidoj, pseŭdoterminoj, reguloj, subreguloj, esceptoj de la reguloj, pseŭdoreguloj... Ĝi montriĝis plej kapturna!».

Pri kio plendas Oljanov?

Unue, pri la multo de la terminoj. Sed la terminoj estas vortoj, per kiuj estas signataj lingvaj fenomenoj. Oljanov ne direktas sian kritikon al la fenomenoj, sed al ties nomoj. Ĉu, tamen, la fenomenoj devas resti sen nomoj? Por ne «rompi la kapon» de la esperantistoj?

Posedi Esperanton ne signifas scii la sciencajn terminojn de la diversaj lingvaj fenomenoj. La plimulto de la esperantistoj ne scias tiujn terminojn kaj ne estas necese scii ilin. Sufiĉas distingi la fenomenojn kaj scii ties lokojn. Tion celas PAGE, sed ne enkapigi al la legantoj la terminojn. Kiel, tamen, PAGE povas realigi ĉi celon sen uzi nomojn, t. e. terminojn?

Oljanov direktas sian proteston ne nur al la terminoj, sed ankaŭ al la «pseŭdoterminoj».

Kion signifas «pseŭdotermino»? Termino, kiu ne estas termino, t. e. nomo, kiu ne estas nomo? La drasta paradokseco de la inventita de Oljanov «termino» malebligas ties komprenon.

La plua plendo de Oljanov estas pri la multaj «reguloj, sobreguloj, esceptoj de la reguloj».

Lingvo — tio estas reguloj kaj «esceptoj de la reguloj». Verko pri lingvo prezentas esploron de la reguloj kaj la esceptoj. Tion faras *PAGE*. La tuta *PAGE*, ekde la komenco ĝis la fino, estas nenio alia ol reguloj kaj esceptoj.

Se pri la «pseudoreguloj», la plendo havus valoron, se ĝi konsistus ne el deklaro kaj kvalifiko, sed el pruvoj, kiujn tamen Oljanov ne prezentas.

Kaj fine pri la «helaj aleoj de la simpla, interesa kaj agrabla Esperanta vortfarado».

La loko de la «simpla, interesa kaj agrabla Esperanta vortfarado» estas en la lernolibroj kun bildoj, humuraĵoj kaj karikaturaj, sed ne en verkoj kiel *PAGE*. Fakte, tamen, la fundamento, sur kiu estas konstruata la «simpla, interesa kaj agrabla Esperanta vortfarado», estas preparata en verkoj kiel *PAGE*, kie oni devas okupiĝi pri «malsimpla, malinteresa kaj malagrabla Esperanto». La vojo al la simpla, interesa kaj agrabla Esperanto estas tiu, kiun *PAGE* montras.

35. «La reguloj pri la uzo de -ig (§ 358) estas tiel komplikaj, ke mi forte dubas, ĉu eĉ la plej talenta lernanto povus orientiĝi».

PAGE konstruas sian vortkunmet-teorion sur la koncepto, ke la radikoj havas gramatikan karakteron. Vortkunmet-teorio, konstruita sur tia koncepto, ne povas ne esti «komplika», ĉar ĝi postulas trakton de la efiko de *igi* laŭparte al la «substantiva» radiko, al la «adjektiva» radiko, al la «verba» radiko ktp, kaj ties transformon rezulte de la efiko de *igi*. Oljanov ne kontestas la koncepton de *PAGE*, do li aliĝas al ĝi. Ĉu, tiam, li pravas plendi pri la komplikeco de la klarigoj pri la efiko de *igi*?

Se pri la lernanto, oni ne devas forgesi, ke *PAGE* ne estas lernolibro. Ĝi celas tiujn, kiuj jam «ellernis» la lingvon.

Konklude, post la pritrakto de la kritikaj notoj de Oljanov, oni ne povas ne agnoski, ke ili, tamen, havas ankaŭ «meriton». Ili, kiel vidite, «helpas» por plia konvinkigo pri la kapablo de la aŭtoroj de *PAGE* penetri profunde en la esencon de Esperanto kaj eltiri el ĝi kaj utiligi nesupozatajn potentojn.

LJUBOMIR MIĤAJLOV

Membro de la Unuiĝo de la Sciencistoj en Bulgario
Sofio (Bulgario)